



LA DELOKIGITOJ DE AFRINO

De du semajnoj(*) Turkio okupacias Afrinon. 250 000 loĝantoj de tiu roĵava urbo rifuĝis en la ĉirkaŭaĵo kaj estas en tre katastrofa situacio.

La fotografaĵoj atingantaj la poŝtelefonon rakontas pri la tragedio anoncita de la agresanto, t. e. la turka ŝtato. La grandaj amaskomunikiloj simulas ne vidi kaj multaj registaroj kaj internaciaj organizoj ĝin permesas pere de sia silento, kvankam, hipokrite, ili sin konsideras defendantoj de la homaj rajtoj.

Antaŭ nur du semajnoj oni devigis 250 000 personojn forlasi sian urbon: Afrino. La internaciaj registaroj kaj organizoj estis direktintaj sian informan fokuson al alia loko: la homa krizo en orienta Guta(1), Sirio. Samtempe, la turka armeo – membro de NATO – kaj ties ĝihadismaj aliancanoj estis sieĝantaj pacan regionon de kunvivado, kiu estis sub 58-taga kruela agreso. Fine, la kurdaj popoldefendaj milicoj, PPT kaj IPT(2), prenis responsan decidon: forlasi la urbon por eviti pli grandan malbonon; tio estas, masakron. Malgraŭ tio, la mesaĝoj de la delokigitaj raportis kaj konfirmis, ke la okupaciantaj ĝihadismaj milicoj, sub komando de la turka armeo, agadis sovaĝe kaj kruele.

“Nenion ni povis kunporti”, asertis al ni Hevi – ŝia nomo signifas “espero” –, “ĉar la urbon ni forlasis nokte, haste kaj impete, sub la frostoj. Ni ne havas veturilon, nek traktoron. Mi, mia edzo kaj niaj tri infanoj devis forlasi nian domon kaj la vivon, kiun tiom pene ni konstruis”. Nun, Hevi kaj ties familio, same kiel miloj da delokigitaj, estas en *Xabha*, sudoriente de Afrino, malmultajn kilometrojn for de *Tell Rifat*. “Ni dormas en malgranda tendo”, ŝi aldonis, “la kvin kunkune, ĉar egas la malvarmo”. Drama estas la stato de la provizora kampadejo.

Kamber *amca* – Onklo Kamber (tiel nomata pro ties aĝo) – antaŭlonge forlasis sian komfortan vivmanieron en Anglio por helpi siajn kurdajn gefratojn en Roĵavo. Li estas el Amedo(3). “Mi volas fari mian kontribuon por la plenumigo de tiu ĉi revo, de tiu ĉi revolucio, por la konkretigo de tiu ĉi modelo pri aliaj kunvivado kaj vivmaniero. Bedaŭrinde, kiel vi povas vidi, multaj estas tiuj, kiuj ne volas, ke la kurdoj kaj la popoloj de Mezoriento vivu pace. Nun ni laboras kurante kontraŭ la horloĝo por eviti pli grandajn turmentojn kaj suferojn al niaj gefratoj de Afrino; sed mankas ĉio”.

Malvarmo kaj malsato.

Fakte, kiel diras Onklo Kamber, al ili mankas tendoj, nutraĵoj, akvo, vestoj ... Malĝoje li parolis: “Multaj homoj mortis pro malsato. Kaj, kiuj atingis ĝis ĉi tie rakontis al ni, ke ili devis forlasi siajn mortintojn survoje, kaj ilin provizore enterigi inter granatarboj”.

Parolas Delal: “Estas miloj da infanoj, kelkaj beboj, kaj al ni mankas akvo kaj nutraĵo. Ni faris peton al UN, por ke ĝi sendu urĝan helpon. Suda Kurdio(4) sendis al ni nur 500 tendojn kaj 1000 matracojn, sed tio ne sufiĉas”. Silan aldonas per voĉmesaĝo, “Tiuj, kiuj havas aŭtomobilon aŭ traktoron povas dormi kune en siaj veturiloj, sed ankoraŭ frostas kaj ni havas nek kovrilojn nek vestojn. La delokigitaj loĝantoj de Afrino ne volas eliri el tie ĉi”, ree kaj ree ŝi substrekas tion, “ĉar ili fidis, ke ili revenos hejmen. Al siaj domoj nun okupaciataj de la ĝihadistoj”.

Silan estas dommastrino kaj ŝia edzo Isak laboris por la nova urba institucio. “La infanoj vizitadis la lernejon. Mia mondo kolapsis kaj, envere, mi min demandas, kial oni malamas nin... Mi eĉ ne volas pensi, kio okazis al mia domo, kiu estas tie, ĉion dispecigante ...”.

Tuja estis la mobilizo el aliaj urboj kaj vilaĝoj de Roĵavo. Laŭ aserto de Azad, centoj da civiluloj alvenis el Kobano, Kamjŝlo(5) kaj Serekanijo(6) per plenplenaj veturiloj: manĝaĵo, akvo, kovriloj, infanvestaĵoj ... Azad estis vojaĝinta al Afrino kune kun aliaj kinreĝisoroj, verkistoj, intelektuloj kaj artistoj por impulsi artismo-renkontiĝon kontraŭ la milito. Tiel, kiel ili estis farintaj antaŭe en Rakaho.

Ili ne povis fari iun ajn kulturan aktivajon ĉar pliintensiĝis la bombadoj de Turkio kontraŭ Afrino. Kaj por ĉiuj estiĝis nepraj aliaj prioritatoj: sukuri la vunditojn, doni sangon, serĉi trinkeblan akvon kaj iel ajn helpi. Azad ĉiutage fotadis tra la sieĝata urbo.

Atestanto de la rezistado

“Mi malscias ĉu iam, kaj kiel, mi povos akcepti tiom da sufero, turmento...”; tion li deklaras nun, reveninte en Serekanijon. Fakte, antaŭ kvar jaroj li proprahaŭte suferis la sieĝon de sia urbo. Pere de siaj fotografadoj li volas atesti pri la rezistado de Afrino; en tiu urbo vivis konkorde ne nur kurdoj, sed ankaŭ araboj, asirianoj, armenoj kaj jezidoj. Ĝi estiĝis la “juvelo” de la roĵava revolucio, estinte la malplej atakita fare de la Islama Ŝtato.

Ekzemple, en Afrino estis universitato, kie renkontiĝis la diversaj kulturoj kaj lingvoj kaj ekzistis forta movado por kooperativa terkulturado, kie la konsiloj de la virinoj havis plenan valoron – grava peko por ĉiaj fundamentistoj, ne nur por la religiaj –. La ekzemploj el tiu teritorio klare montris, ke eblis starigi bazan demokration, dispartiga kaj partoprenanta; ĝuste pro tio maleblis, ke oni ne ataku ĝin.



Respondeca pri tiu ĉi krimo estas ne nur la turka ŝtato aŭ la ceteraj membroj de la NATO – kiuj restis silentaj – aŭ la Islama Ŝtato – kiu partoprenis en la sieĝo –. La internacia komunumo mutis kaj, kiam ĝi ion timide deklaris, estis malfrue kaj maltrafe.

La tragedio de tiuj miloj da delokigitaj okazis antaŭ ĉies vido: du semajnoj pasis de kiam la turka armeo okupis Afrinon kaj UN mem ankoraŭ ne decidis, ĉu tiu ĉi tragedio “indas” esti konsiderata homa katastrofo. Miloj da homoj, inter ili amaso da infanoj, tie restas ankoraŭ, forlasitaj en tiu dezerta zono, sen akvo, sen nutraĵo, sen ies helpo. Tuta delokigita loĝantaro kies nura “delikto” estas strebi pace kaj harmonie kunvivi, kaj tion atingi.



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj)

- (1) Ghouta, en la araba.
- (2) Popolaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Gel) - Inaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Jinê).
- (3) Amed (Diyarbakir en la turka).
- (4) Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.
- (5) Qamîshlo.
- (6) Serê Kaniyê.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Jose Miguel Arrugaeta kaj Orsola Casagrande. Fotoj: Azav Evdike.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 7-an de Aprilo 2018-a.

Tradukis: NXC. Aprilo 2018-a. Provlegis: DS.

